# NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responda eldonanto :
Lucien BOURGOIS,
21, Rue Gambetta,
NOYELLES-GODAULT (P.-de-C.).

Kotizoj (kun bulteno)

| | | | |
|---|---|---|---|
| a) | Junuloj | : | 2 Fr. |
| b) | Aktiva membreco | : | 3 Fr. |
| c) | Subtenanto | : | 5 Fr. |

Fédération Espérantiste du Nord de la France,
17, Rue des Bouvreuils, ARRAS (P.-de-C.).
C.C.P. LILLE 517-15.

Ĝenerala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, CALAIS (P.-de-C.).

Informilo n-ro 5 — Oktobro 1964

## VIVU CAUDRY !

Preskaŭ 100! ... jen la rekorda cifero de la partoprenintoj.

Jam de longe niaj regionaj manifestacioj ne atingis tian amplekson kaj la L.K.K.-anoj povas fieri pri tiu neforgesebla tago.

Dank' al la grava partopreno de eksterlandaj amikoj (22 Belgoj kaj 3 Nederlandanoj) regiona gazeto titolis "Eŭropa Kongreso de Esperanto en CAUDRY".

Inter la gastoj ni rimarkis la ĉeeston de Ges-roj ROOSE kaj MAERTENS (el Bruĝo), F-ino ORSOLINI (Karloreĝo), Ge- Ben WEBER k filo (Middelburg), BOURDEAUX, Prezidanto de la Pariza E-Grupo - Respondeculo pri la Informa Fako de U.F.E., PIRON, SAT-Komitatano (Parizo).

Senkulpiĝis : Ges-roj BUERICK, DUCROCQ, SKOLE, Van PARYS.

Je la 10-a, S-ro EGO, Prezidanto de la loka grupo malfermis la laborkunsidon per bonvenvortoj. Li poste transdonis la parolvicon al la Federacia Prezidanto, S-ro ODENT, kiu gvidis la laborojn, dum kiuj oni pritraktis la jenajn temojn :

- Klopodoj por malfermo de Esperanto-kursoj en la publikaj lernejoj.
  (raportis S-ro BODSON) : Unua kontakto okazis kun la Akademiaj Inspektoroj en Nord kaj P.-de-C..
- Markola Kongreso (raportis S-ro DOYELLE). Ĝi okazos Pentekoste en Ostende.

S-ro GILOTEAUX informis la federacianojn pri diversaĵoj antaŭ ties aperigo en la E-gazetaro.

- Salutis nian Kongreson Radio Varsovio kaj organizanto de samdata kongreso en Lindaŭ (Bavarujo).

- Nova libro "Frisaj rakontoj en Esperanto", parte verkita de samfederaciano, S-ro Sipke STUIT, el Arras.

- Aperigo de multaj artikoloj en la ne-esperantista gazetaro, dank' al la aktivaj kluboj el Valenciennes, Lille, Roubaix, Tourcoing, Calais, ktp.

- Propono al Unuiĝintaj Nacioj, okaze de la jaro de Internacia Kunlaboro. Nepre necesas kolekti multajn subskribojn, precipe de respondecaj funkciuloj en organizaĵoj (kolektivajn subskribojn nome de ĉi tiuj asocioj kiaj sindikatoj, Amikaroj, grupoj).

- "Kiamaniere vigligi la kluban vivon" estis la temo de la lasta traduka konkurso. Tamen, neniu respondo alvenis.

- Malmultekostaj diskoj eldonitaj de UEA pri la 49-a U.K. en Hago.

- Filmoj en E-o riceveblaj de diversaj ambasadorejoj.
S-ro Giloteaux sugestis prezenti kelkajn en Lille, okaze de nia federacia tago.

- Gastigado de eksterlandanoj : Li akcentis pri la neceso plibonigi ĝin per kolektiva reto. Se ĉi tiu propono interesas vin, se vi deziras inviti eminentajn esperantistojn, ĉu por tranoktado, ĉu por nutrado, skribu al S-ro Giloteaux.

- S-ro DITACROUTE, Ĝenerala Sekretario, raportis pri la financa situacio de S-ino HAUDEBINE, Speciala Delegitino de UEA en Hindujo. La Federacio decidis helpi ŝin per sendo de 50 Fr.

Antaŭ la fermo de la kunveno, S-ro Jacques WARIN, Prezidanto de la Laika Amikaro en Caudry, Konsiliano de la Nacia Sindikato de Instruistoj, eldiris kelkajn salutvortojn (esperantlingve!). Li deziris sukceson al la E-Movado, kies idealon li aprobas.

Je 12.30 h, la kongresanoj iris al la urbdomo, kie, en la plenplena salono, akceptis ilin Lia Urbestra Moŝto, Albert DHELIN, kaj magistratanoj : S-ro SENEZ k COLOMBIER.

Post dankvortoj de S-ro EGO, S-ro DHELIN bonvenigis la kongresanojn.

S-ro ODENT prezentis la proponon al Uno. Ankaŭ prenis la parolvicon S-roj BOUQUIN, Prez. de Lille-Esperanto kaj ROOSE, Prez. de la Bruĝa Grupo.

Post la tradicia honorvino kaj poemo de S-ro AUGUEZ, tiu oficiala ceremonieto finiĝis per "La Espero".

En la Festsalono, loterio rekompencis ĉiujn ĉeestantojn per belaj lotoj, fabrikaĵoj de la loka industrio.

Post la bankedo, ĉiuj haltis ĉe Strato Zamenhof, antaŭ la strattabulo, kie oni fotis la grupon. Dum la vizito de puntfabriko, la esperantistoj ricevis ĉiujn po unu mantilon (specimenoj donacitaj de la kodriaj fabrikantoj).

Ni petas la agemajn aranĝintojn - S-roj EGO, BODSON k BRICOUT - akcepti nian dankplenan gratulon pro tiu agrabla tago, kiu restos gravurita en ĉies memoro.

Rendevuo en Lille, fine de Aprilo, ĉe la Internacia Foiro.

Fernand DITACROUTE,
Ĝenerala Sekretario.

# NIA VIVO

Berck-Plage (P.-de-C.) : S-ro Maurice BORDESSOULLE suksese trapasis la duagradan E-ekzamenon "Supera Atesto pri Lernado".
Ni varme gratulas lin kaj esperas, ke li trovos la eblecon instrui la lingvon.

Brêmes-les-Ardres (P.-de-C.) : Niaj danaj geamikoj SKOLE afable akceptis la najbarajn esperantistojn el Calais. Okazis amika kunveno, en kiu ankaŭ partoprenis la federaciaj Prezidanto (S-ro ODENT) k kasisto (S-ro DOYELLE) k du membroj de la londona grupo. Miniatura trilanda renkontiĝo!

## VIZITO DE EKSTERLANDANOJ :

Amiens (Somme) : Partopreninte la U.K-on en Hago, S-ro AIRA, finna esperantisto el Turku poste restadis en Baugé k veturis ĝis Amiens, dank' al la afableco de S-ro BARBOT. Tieli renkontis la lokajn grupanojn.
KOĈVARA : Por la dua fojo, nia ĉeka amiko gastis ĉe parencoj en Méricourt. Li vizitis S-rojn BOURGOIS k CARON (Noyelles-Godault), ERJAVEC (Lens), GILOTEAUX (Wattrelos), antaŭ ol pasigi kelkajn tagojn en Calais ĉe S-ro DUCROCQ.

## 4-a MARKOLA KONGRESO :

Ĝi okazos en Ostende (Belgujo), Pentekoste - de la 5-a ĝis la 7-a de junio - en la kadro de la Belga E-Kongreso.

La kulturaj k turismaj programeroj estos komunaj.

Antaŭfiksita aliĝkotizo : 10 F.F. (speciala tarifo por unutaga partopreno.)

Notu tion en via agendo!

Tourcoing (Nord) : Por festi sian unujaran ekziston, la klubo Tourcoing-Esperanto kore invitas la federacianojn k eksterlandajn amikojn al la kunveno, kiu okazos dimanĉe la 6-an de decembro, je la 15-a h., en CENTRE CULTUREL - 100, rue de Lille, Tourcoing. El la tagordo : ludoj kun premioj - traduka konkurso - prezento de E-gazetoj el 40 landoj.
Informejo : Esperanto, 7, rue Saint-Saëns, Wattrelos.

## Senpaga Perkoresponda Kurso :

En la nova studperiodo, la federacianoj estas petataj vaste reklami pri ĝi en la lokoj, kie ne funkcias publika kurso.

S-ro LENEL rezignis pri sia kunkcio. Sekve, de nun, S-ro CURNELLE korektos la taskojn. Interesatoj sin turnu kun reafranko al :

S-ro René CURNELLE, 26, rue des Martyrs-de-la-Résistance,
LAMBERSART (Nord).

"Esperanto-Pochettes" : La konata 22-leciona kurso estas havebla je la prezo 2,50 F (unuopuloj) k 2 F (grupoj) afrankite.

Mendu al : S-ro Hubert FEREZ (C.C.P. TOULOUSE 632-15).
Nova adreso : "Villa Les Marguerites", 7, Avenue de Reims / NICE (A. M.).

## Ĉu vi scias tion?

En Esperanto, 12 verbaj finaĵoj sufiĉas por esprimi ĉiujn nuancojn de la pasinteco, prezenco k futuro, dum la rusa lingvo nombras 157 finaĵojn, la germana 364, la angla 652 k la franca 2265!

TRADUKA KONKURSO : (Respondeculo : L. GILOTEAUX).
Traduku Esperanten la jenan tekston :

ROUBAIX - 114.000 habitants - l'un des plus grands centres industriels de France : peignage, filature, tissage de laine (Roubaix-Tourcoing "soeurs siamoises" produisent 90 % du tonnage français de laine peignée et 50 % des lainages pour robes et draperies), laine cardée, tapis, textiles artificiels, coton, bonneterie, soie, tissus d'ameublement, velours.
Usines métallurgiques, caoutchouc, produits chimiques, etc...

MONUMENTS : Eglise Saint-Martin du XVe siècle (rétable du XVIe siècle), tombeau du XVe siècle (carillon de 38 cloches); Eglise Notre-Dame (tapisserie des Gobelins du XVIIIe siècle); Hôtel de Ville (hauts reliefs, musée J.J. Weerts); Ecole nationale des arts et industries textiles; Parc Barbieux de 33 hectares; centres résidentiels modernes H.L.M. et C.I.L.; chapelle moderne d'Hempempont (mosaïque et vitraux); chapelle espagnole de Mouvaux.

Oni sendu la taskojn al : Lucien GILOTEAUX, 7, rue Saint-Saëns, WATTRELOS (Nord).

## LA GAZETARO KAJ NI

"L'Elan", trimonata poezia k beletra revuo dediĉis parton de sia frontpaĝo k la dorspaĝon al Esperanto. Tion ni ŝuldas al S-ro Alain RINGOTTE, al kiu ni direktas varman gratulon. En tiu 27-a numero (tria kvaronjaro 1964), la animanto, S-ro Louis LIPPENS verkis ĉefartikolon titolitan "L'Espéranto au service de la Paix" k Esperantan poemon. Nia amiko Guy AUGUEZ ankaŭ kontribuis per franclinva traduko de A. MASSELIER.

La koncerna numero 27-a estas havebla kontraŭ 1,50 F + 0,12 F (sendkosto) ĉe "L'Elan poétique et littéraire" (C.C.P. LILLE 1978-31).

"L'ESPERANTO SUR LES ONDES" - Sub tiu titolo aperis en "La Semaine Radio-Télé" (15/21 Aŭgusto) interesa artikolo, kiu sciigas ke, en 1963 20 radiostacioj dissendis 1700 elsendojn dum 534 horoj. Sekvas kompleta programo por Aŭgusto de Radio Romo kaj tutsemajna programo de Varsovio.

"Frisaj Rakontoj en Esperanto" estas la titolo de nove eldonita libro presita en Nederlando de Presejo-Eldonejo Laverman S.A., Drachten.

Ĝi entenas 20 rakontojn en 184 paĝoj. El tiuj rakontoj, federaciano, S-ro Sipke STUIT, bone konata en la Nordfrancaj Esperanto-rondoj, esperantigis naŭ.

La desegnoj de la koverto plaĉas al la okuloj. La presliteroj estas bonegaj, facile legeblaj. Pri la prezo : 9,00 F; sed por opa mendo de 5 ekzempleroj, oni profitas rabaton de 25 %; sekve, la prezo estas 6,75 F.

Interesatoj sin turnu al : S-ro Sipke STUIT, 6, Route de St-Pol, ARRAS.

(Recenzis : "La letero", bulteno de "Centre Culturel Calaisien".
Redaktas : Edouard BONVOISIN).

Universala Kongreso de Esperanto en Hago :

Reprezentis la federacion : Ges-roj BUERICK, CONTART, CURNELLE, DUMARQUEZ; F-inoj HOURIER J.M. k P.; Ges-roj LEGROS, F-ino LEMIRE, F-ino MAUCHIEN; Ges-roj MONNIER; S-ro PHILIPPE; F-inoj PREUX k VERBEKE.

La 50-a Universala Kongreso okazos en Tokio (Japanujo), de la 31-a de Julio ĝis la 7-a de Aŭgusto.

NOYELLES-GODAULT : Vizito de ĉeka esperantisto.

La 10-an de aŭgusto, duafoje, ni havis la plezuron akcepti S-ron Drahomir KOĈVARA, Komitatanon de la tutlanda ĉekoslovaka E-Asocio, el Ostrava. Li kompleze respondis al niaj demandoj; k mi ĉerpis por vi la plej interesajn punktojn.

Ostrava situas en Silezio apud la pola landlimo. Ĝi nombras 250.000 loĝantojn. La regiono aspektas kiel tiu de P.-de-C. en ties mineja parto, ĉar tie ankaŭ staras ŝaktoj kaj minejaj teramasoj. Karbelfosado k metalurgio konsistigas la ĉefajn tieajn industriojn. Polaj limloĝantoj aldoniĝas al la loka laborforto.

En Ostrava funkcias 4 E-kluboj, nome : la uzina rondo kun 40 membroj, kiun li gvidas, la tramista grupo, la grupo el Ostrava-Hulvaki kaj grupo de veteranoj. En jaro 1952, ĉi tiuj konstruigis du monumentojn : unu honore al KOMENSKI, kiu jam en Mezepoko proponis projekton de internacia lingvo, kaj unu al D-ro ZAMENHOF.

En tuta ĉekoslovakio ekzistas 112 E-rondetoj arigantaj 5.000 membrojn. Tiuj rondetoj funkcias en la Kulturdomoj aŭ en uzinoj sub gvidado de saljrataj oficistoj. En Ostrava-regiono funkcias 20 E-kluboj.

La ĉekoslovaka E-komitato konsistas el 12 membroj elektitaj inter la gvidantoj de la diversregionaj kluboj. Ĝi sidas en Praha ĉe Ministerio de Kulturo. La vojaĝelspezoj de la membroj estas je la ŝarĝo de tiu ministerio, kiu krome metas je ilia dispono duontagan sekretariinon dum la tuta jaro.

La ĉeka monunuo, la krono, dividiĝas en 100 halerojn. Ĝi valoras la trionon de unu (nova) franca franko. Antaŭ unu jaro unu litro da benzino kostis 4 kronojn, t.e. : 1,30 F.F. En Orient-Eŭropo, kiel cetere en Francujo en Okcident-Eŭropo, Ĉekoslovakio ĝuis la "privilegion" posedi la plej multekostan benzinon. Depost tiam malaltiĝis ĝia prezo (tion ankaŭ ni spertis), dum altiĝis tiu de la trafikasekuroj - tamen ankoraŭ malpli kostaj, ol ĉe ni. La trafikreglamento estas pli rigora : la vojuzantoj estas devigataj submetiĝi al la alkoholtesto.

La nacia aŭtofabrikado estas prizorgata de firmo SKODA, sed oni vidas kelkajn francajn aŭtojn (Renault - kvar- kaj okĉevalo), Simca-Elysée ktp.).

Nur homoj, kiuj okupas gravan postenon aŭ geedzoj, kiuj ambaŭ laboras, povas aĉeti turisman aŭton, pro la pezaj impostoj.

Luksaj varoj : <u>alkoholaĵoj</u> (unu botelo da ordinara tablovino kostas 5 F.F.) kaj <u>kafo</u> (100 F.F. po kg.).

Male, en Francujo, la prezo de ĉasaĵoj multe superas. Notinde : en Ĉekoslovakio, ŝafaĵo estas la plej malmultekosta buĉoviando.

La fridujoj estas pli avantaĝaj en Francujo : por duobla kapacito, la prezo estas sama. Tamen, mirigis nian vizitanton la alta luprezo de la loĝejoj en nia lando.

Pri komerco, ne ekzistas vigla konkurenco kiel en Francujo, ĉar la vendistoj estas ŝtatsalajruloj. La ŝtato provizas sin ĉe la de ĝi elektitaj liverantoj. Kompreneble, el tio iafoje suferas la kvalito de la varoj, ĉar la konsumantoj ne trovas saman diversecon, kiel laŭ la reĝimo de libera konkurenco. Promenante sur foirejo, nia ĉeka amiko miris, vidante komercistojn, kiuj ĉarlatanreklamis por altiri klientojn.

Ĉiuj sanaj viroj estas devigataj labori.

Sur sociala kampo, la malsanuloj ĝuas gravan avantaĝon : la kuracado k medikamentoj estas tute senpagaj. Ĉekoslovakio ankaŭ zorgas pri la plialtigo de la intelekta nivelo de siaj laboristoj : ĉi tiuj povas sekvi senpagajn kursojn laŭ sia interes-branĉo k sekve ricevi pli altan postenon.

Ĉiuj uzinoj havas siajn klubojn - teatraj trupoj, ĥoroj k multspecaj aktivaĵoj. La animantoj de tiuj rondetoj estas pagataj.

En Ĉekoslovakio la lernjaro komenciĝas la 1-an de oktobro en ĉiuj lernejoj. La somerferioj daŭras du monatojn. Libertempoj ne okazas tiel ofte, kiel en Francujo.

La lerneja frekventado estas deviga ĝis la 15-a jaraĝo. La studsemajno konsistas el 6 tagoj. La lernantoj aliĝas al la laborbrigadoj : krom nutro, ili ricevas poŝmonon. En regiono Ostrava ili helpas por la rikoltado de lupolo. Por junulo malpermeso partopreni en la laborbrigadoj estas konsiderata, kiel puno.

La uzina E-rondo kunvenas ĉiujare kun Poloj apud la landlimo en Tatroj - Karpata Montaro.

Raportis : Lucien BOURGOIS.

---

Ni bonvenigas jenajn novajn membrojn :

| | |
|---|---|
| Calais (P.-de-C.) | S-ro CANDEILLIER Robert - 145, Bd Gambetta. |
| Houdain " | F-ino GAJEK Marie - 26, Rue Galliéni. |
| " " | S-ro KALISZAK Jean - 5, Rue Mitry. |
| Wasquehal (Nord) | F-ino MERCHEZ - 42, Rue Pasteur. |

Adresŝanĝoj :

| | |
|---|---|
| Lens (P.-de-C.) | S-ro ERJAVEC Raphaël (antaŭe 41, Rue St-Antoine) loĝas nun 32, Rue Léo-Delibes. |
| | S-ro LOURDEL Yves, antaŭe en Hénin-Liétard, estas nun studento en Mineja Alternejo. Dum la studjaro, lia adreso estas : Maison des Elèves, 34, Rue Francis-Baulier, SAINT-ETIENNE (42). |
| | S-ro JENNEQUIN M., antaŭe en Arras, loĝas nun en DAINVILLE (P.-de-C.), Route Nationale. |
| Arras (P.-de-C.) | S-ro GROUSSET, antaŭe 16, Rue Saint-Michel, loĝas nun : 87 B, 2, Rue Fragonard - HAUTS-BLANCS-MONTS. |

NE FORGESU PAGI LA FEDERACIAN KOTIZON 1965! Antaŭdankon!

---

Bulteno ofsete presita de : Centre National Espéranto-Office, 9 Bis, Rue du Cdt-de-Poli, ORLEANS (Loiret).

Le Gérant Resp. Lucien BOURGOIS, 21, Rue Gambetta, NOYELLES-GODAULT (P.-de-C.).